

Heinrich Heine,  
En Majo

*tradukita de Manfredo  
Ratislavo*

En Majo, kiam ĉiuj  
Burĝonoj malfermiĝis,  
La amo kiel floro  
En mia kor' estiĝis.

En Majo, kiam ĉiuj  
Birdetoj sin aŭdigis,  
Al ŝi deziron mian  
Sopiran mi sciigis.

...

Heinrich Heine,  
En la mirinda bela  
Maj'

*tradukita de Kálmán Ka-  
locsay*

En la mirinda bela Maj',  
dum sin burĝonoj fendis,  
en mia kor' la amon  
mi disvolviĝi sentis.

En la mirinda bela Maj',  
dum birda tril' ne ĉesis,  
al ŝi sopiron mian  
konfide mi konfesis.

...

Heinrich Heine,  
En admirinde bela  
maj'

*tradukita de Hans-Georg  
Kaiser*

En admirinde bela maj',  
dum jam burĝonoj krevis,  
jen ankaŭ miakore  
la amo sin eklevis.

En admirinde bela maj',  
dum birdotril' senbridis,  
jen mi al ŝi sopirojn,  
dezirojn, ekkonfidis.

...

Heinrich Heine,  
Im Mai

Im wunderschönen Monat Mai,  
Als alle Knospen sprangen,  
Da ist in meinem Herzen  
Die Liebe aufgegangen.

Im wunderschönen Monat Mai,  
Als alle Vöglein sangen,  
Da hab' ich ihr gestanden  
Mein Sehnen und Verlangen.

...

Heinrich Heine,  
En dolĉega Maj'

*tradukita de Friedrich Pillath*

Printempe en dolĉega Maj',  
Dum la burĝonoj krevis,  
El mia koro ĝerme  
Amsento sin eklevis.

Printempe en dolĉega Maj',  
Dum birda kanto sonis,  
De l' kora mi sopiro  
Konfeson al ŝi donis.

...

Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1982-11-14.

MR-002-4 / Arg-203-403  
(2004-04-05 20:37:00)

La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I.

Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, \*1911 - †1976).

Arg-203-1082 (2010-05-26 12:08:05)

Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).

Arg-203-431 (2004-03-24 07:33:04)

La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. La traduko estas korektita laŭ la lasta ŝanĝo, kiun faris s-ro Hans-Georg Kaiser en 2004-03-21.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17).

Arg-203-402 (2004-03-24 07:28:07)

Das Gedicht befindet sich in Heinrich Heines Werk „Buch der Lieder“, im Abschnitt „Lyrisches Intermezzo“, Nr. I.

Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04.03).

Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)

Tiu ĉi traduko aperis en *Elektitaj Poemoj*, Berlin: Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek (2a eldono), 1920, p. 13. La origina germana-lingva versio troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. Pri F. Pillath vidu ankaŭ la vikipedian retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich\\_Pillath](http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath).